

La estonteco de ISAE kaj Scienca Revuo

La 26-an de julio 2011 okazis la jarkunsido de ISAE, kadre de la 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago. Nur nun mi retrospektive rimarkas ke, pro feliĉa hazardo, la tie alestantaj anoj kaj amikoj de nia Asocio kaj ties Scienca Revuo kolektiĝis kaj en la preciza datreveno de la tago kiam d-ro Zamenhof publikigis sian Unuan Libron en 1887, kaj en kongreseja salono kies nomo honoris profesoron Paul Neergaard (1907-1987), tre eminentan danan scienciston kaj unu el la plej elstaraj kaj respektataj E-aktivuloj en la tuta historio de nia fenomeno.

Eĉ se tiam ni ne aludis al tiu bela koincido, ĝi kaj la varme entuziasmiga etoso de la kunsido klare spegulis ĝuste tion, kio ISAE ĉiam kerne estis kaj plu estas, do kunlabora organizaĵo por homoj memvole engaĝiĝintaj je tiuj du intense mobilizaj kaj stimulaj strebadoj de la homa inteligento: Esperanto kaj la scienco.

La nova estraro de ISAE, kiun ni sukcesis konsistigi el tiamaj ĉeestantoj unuope elektitaj per varma aplaŭdo de la publiko, volonte alprenos la malfacilan respondecon daŭrigi la laboron de Prof. d-ro Rüdiger Sachs, kiu preskaŭ sola sukcesis pluvivigi la Asocion kaj modele eldoni Scian Revuon dum la lastaj 12 jaroj. Kun admiro mi konstatas, ke li estas unu el tiuj homoj kiuj persiste batalas la tutan vivon por siaj idealoj kaj tial iĝas nemalhaveblaj, laŭ veraĵo tiel esprimita de la germana poeto Bertolt Brecht.

La ĉefaj ideoj de mia programo kiel nuna prezidonto de ISAE, kiuj iom utilas kiel unu el la elementoj por la planado kiun la nova estraro komencas fari en siaj perretaj kunsidoj, estis jam prezentitaj en prelego por la centjariĝa Simpozio de nia Asocio (Scienca Revuo 3/2006: 127-140), poste en la revuo Esperanto de UEA (decembro 2006: 243 k.a.) kaj ekde tiam evoluigitaj en diversaj publikaj forumoj kaj eseoj, ekz. dum mia oficperiodo kiel UEA-estrarano pri scienco kaj faka agado (2007-2010). Mi klopodos resumi ilin kaj ĝiajn praktikajn sekvojn:

1. Kiel esence lingva kaj eduka iniciato kun kerne demokratiaj trajtoj, Esperanto ligas sin al la scienco, fundamenta kultura atingo de la homa civilizo. Fakte, ambaŭ entreprenoj estas similaj laŭ ilia internacie kunlabora, kolektiva kaj sciinterŝanĝa karaktero.

Por tiu intelekta kunfluo Scienca Revuo, pri kies redaktado kaj eldonado ekde la jaro 2012 ĉefe respondecos nia estrarano Johannes Müller, plu ludos sian tradician rolon kiel altnivela periodaĵo por pritrakti sciencajn temojn per nia konstruita interlingvo, kaj tiel stimuli i.a. dialogon inter la disciplinoj, je nia modesta skalo. Krom papera versio, alternative estos abonebla malpli kosta reta versio, kaj plej prioritare ni klopodos starigi paĝaron por ISAE en interreto.

Ĝis nun, pagi la revuabonon automate signifis (pasivan) aliĝon al ISAE, sed ni volas krei senton de membreco al vivanta asocio en kiu oni aktiviĝu por la komuna strebado starigi pontojn inter la scienca mondo kaj Esperanto. Eblas subteni nian agadon per simbola aliĝo.

2. Kvankam la angla pli kaj pli iĝis la internacie reganta lingvo en la komunikado inter sciencistoj, la tutmonda aspiro al demokratiaj sciosocioj, kies civitanoj estu kleraj, mense liberaj kaj priscience edukitaj homoj, permesas al ni ĵeti novan lumon sur apudajn kampojn, nome la publikan prisciencon kaj la sciencon edukadon al infanoj, junuloj kaj plenkreskintoj. Kiel anoj de kerne lingvokonsci(ig)a movado, ni devus esti kapablaj levi la demandon pri lingva diverseco kaj lingva justeco koncerne tiun gravan aspekton de la rilato inter scienco kaj socio.

Nome de ISAE, mi prelegis pri tiu ĉi strategie grava aspekto de nia agado en Simpozio organizita de ILEI kaj la Universitato de Kopenhago. Ĉi-cele ni strebos plifortigi la kunlaboran rilaton al aliaj fakaj asocioj, privilegie al ILEI. Ĝuste pri nia eduka flanko okupiĝos nia estrarano Claude Labetaa, mem emerita mezlerneja instruisto pri fiziko. Unu el la dezirindaj produktoj estus disponigi bazajn instrumaterialojn en Esperanto pri diversaj sciencaj fakoj, ĉar en nia profunde maljusta mondo kleriĝi pri scienco ankoraŭ ne estas rajto ĝuebla de ĉiu homo.

ISAE do plifortigos sian karakteron esti bonveniga reto malferma al ĉiu esperantulo konscia pri la valoro de la scienco por la socio, kun ties lingva aspekto. Por tio, ĝi orientos sin al eksteraj rilatoj, eble per partopreno en Sciencaj Festivaloj metantaj la sciencon je la dispono de la civitanoj. Ni planas oficiale registriĝi kiel Asocio, eble kun adreso ĉe la CO de UEA danke al nia aliĝinteco al la ĉefa organizaĵo de Esperantujo, por prezenti projektojn financitajn de diversaj fondaĵoj aŭ registaraj instancoj, danke al la ĉi-terena sperteco de nia estrarano Francesco Maurelli.

3. ISAE devas ludi gvidan rolon en la terminologia flegado de Esperanto, ĉar ĝi estas vera homa lingvo potencie utiligebla sur ĉiu kampo de la scienco. Tiel, Scienca Revuo havos konstantan sekcion pri tiu grava sfero sub la gvido de nia estraranino Mélanie Maradan, elstara fakulo pri terminologio.

Kun grandegaj admiro kaj dankemo al Prof. d-ro Sachs, ni pretas transpreni la ISAE-torĉon, kaj bezonas la kontribuadon de kiel eble plej multaj homoj, ĉar la taskoj kaj agadterenoj estas multaj.

JOSÉ ANTONIO VERGARA